

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinavaj kronoj 2,00 = germanaj markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portugalaj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj $2\frac{3}{12}$.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petiltinio. 10 % rabato por duonjaraj. 25 % rab. por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige* (Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 10 (46)

la 20:an de novembro 1899

IV:a jaro.

Al niaj abonantoj

Ni tre insiste petas la amikojn de la gazeto Lingvo Internacia, ke ili ne forgesu tion, kion ni diris en la numero antaŭa. Se ili efektive volas, ke la gazeto daŭrigu eliradi, ili tuj ensendu al la redaktoro en Upsala sian promeson pri abono de unu aŭ kelkaj ekzempleroj por la jaro venonta.

Certe ni ne estas solaj en la konvinko, ke la ĉeso de L. I. nun malutilus al la afero Esperanta, kaj ke almenaŭ unu plene Esperanta gazeto estas io necesa.

La unua resonado de nia alvoko en n:o 9 estis por ni tre kuraĝiga: s-ro Laurén en Kannus jam promesis, ke li garantias 50 abonojn el Finnlando ĉe tia kondiĉo, ke li povos sendi la pagon kvaronjare. Tiun ĉi kondiĉon ni kun granda plezuro konsentas al personoj, kiuj mendas pli ol 10 ekzemplerojn.

Speciale la rusajn abonantojn ni petas turni sin rekte al la redaktoro en Upsala, ne al iu perantulo en Rusujo, ĉar tio kaŭzus konfuzon kaj prokraston.

Kaj laste unu vorton tute preterire!

Ni ne kredas, ke ekzistas persono inter la esperantistoj, kiu pensas, ke ni laborus por gajni personan profiton el nia esperantista agado. Se tia penso naskiĝus en ies cerbo, li devas tuj forĵeti tian eraregan penson. Dio scias, ke, se ni ion gajnis per nia laboro, oron kaj gloron ni *ne* gajnis. Tio tamen ne estas al ni ia disreviĝo, ĉar ni neniel serĉis ilin.

La redakcio.



Novajoj.

Klubo Esperantista en Upsala kunvenis en la Urba hotelo la 9-an de novembro, h. 9 ĝis 11 vespere.

Alestis s-roj Sandborg, Holm, Nylén, Holmqvist, Agrell, leŭtenanto Salwén, Vestman kaj Zachrisson.

Por prezidi la kunvenon oni elektis s-ron Nylén. Dum la tuta pasinta jaro la Klubo havis neniajn kunsidojn, ĉar la prezidanto forestis en Stokholmo kaj en vojaĝoj alilandaj, kaj trovas sin nun en Azio. Tial por ke la Klubo povu agadi regule kaj ofte kunveni, oni decidis elekti vic-prezidanton, kvankam la regularo ne antaŭvidis la bezonon de tia ofico. Oni elektis unu-voĉe s-ron Nylén vic-prezidanto de la Klubo.

Plu oni decidis aranĝi oftajn kunvenojn de la membroj por vivigi ilian intereson por la komuna afero kaj precipe por doni al ili okazojn por ekzercisian scion kaj lertecon pri Esperanta parolo. Pri la programo de tiaj ekzercaj kunvenoj fariĝis tre longa preparolado, en kiu partoprenis pli malpli ĉiuj alestantoj kun diversaj projektoj. La komuna opinio estis, ke ia severa programo ne estas bezona, nur ke unu membro metu la temon kaj enkonduku la preparoladon, dezirinde pri esperantista problemo.

Dum la pasintaj monatoj la agado de la Klubo Esperantista Upsala, kvankam ĝi ne aperadis per kunvenoj, tamen estis rilate viva.

En la aŭtuno de 1898 la dua eldono de la sveda lernolibro elvenis.

La disvendado de libroj estis zorgata en laŭdinda maniero de la kasisto s-ro Sandborg. Multo da mendoj de svedaj kaj ankaŭ de norvegaj kaj finlandaj librovendejoj kaj privataj personoj alvenis kaj estis plenumitaj.

Amaso da leteroj kaj demandoj estas ricevitaj kaj responditaj.

La Klubo ĝis tiu ĉi printempo havis la zorgon pri la administrado kaj dissendo de la gazeto Lingvo Internacia, kiu konstante redaktadas la nuna vic-prezidanto de la Klubo.

La sveda-esperanta vortaro, kiu de tre longa tempo estis neakirebla, estis transdonita al la presejo kaj estas nun prete presita en nova eldono, trarigardita kaj iom pligrandigita de s-ro Nylén.

Propaganda folieto en sveda lingvo estas presita kaj senpage dissendita por disdonado por altiri la atenton de la publiko al Esperanto. Ĝi estis metita sur la anoncaj tabuloj de diversaj kluboj kaj societoj studentaj en Upsala.

Konstanta anonco pri Esperanto kun sciigo pri lernolibroj kaj vortaroj estas presata en la gazeto "Upsala Nya Tidning", petanta interesitajn personojn turni sin al la adreso de s-roj Nylén kaj Sandborg.

* * *

Nova nacia verko pri Esperanto. "Kratki svjedenia za mejdunarodnija jezik Esperanto. Prevel G. P. Oreškof." Tio ĉi estas la nomo de broŝuro, kiu sendis al ni la verkinto. Ni ne scias la bulgaran lingvon, kaj pro tio estas al ni malfacile aŭ preskaŭ neeble ricevi ian detalan opinion pri la indo kaj boneco de la verko. Tamen rigardante la gramatikan parton de la libreto ni trovis tre multe — ni bedaŭrinde devas diri *tro* multe — da preseraroj.

Por ke verko ia povu alporti utilon al la ideo, por kies bono ĝi estas difnita, ĝi devas prezenti *enhavon veran en korekta formo*, alie ĝi povus eĉ fari malutilon. Tial ni ne povas tro insiste peti ĉiujn verkistojn bone zorgi pri la detala korektlegado de la provaj presaĵoj de siaj verkoj. Ili devas ankaŭ antaŭ la presigo transsendi al d-ro Zamenhof la Esperantan tekston, por ke ĝi estu purigita el sia nacia barbareco.

* * *

Societo "Espero" dissendis al multaj esperantistoj rusaj kaj gazetoj presitajn anoncojn kun la sekvanta enhavo:

"Espero", Societo por disvastigado de la lingvo internacia Esperanto partoprenos en la venonta tutmonda ekspozicio 1900 jar. en Parizo. (Espero havas du kvadratajn arŝinojn da spaco ĉirkaŭirebla en I grupo de la Rusa sekcio de l' ekspozicio). Dezirante prezenti en la ekspozicio ĉion, kio estis farita por la celo de la Societo ĝis nun, Espero proponas al ĉiuj siaj membroj, kiuj ne pagis la membran enporton (2 rub.), — sendi ĝin al la Societo, kaj petas helpon de ĉiu homo, aprobanta la komunikigon de popoloj diversnaciaj per la helpo de neŭtrala lingvo.

La vitromeblo de la societo Espero estos centra punkto por esperantistoj de la tuta mondo, kiuj intencas viziti Parizon dum la ekspozicio. Cetere, ĉe la vitromeblo estos metita la libro-adresejo en kiu ĉiu esperantisto devas skribi sian adreson kaj nomon.

La adreso de la Societo Espero estas: S:t Peterburgo, Kazanskaja 26, loĝ. 52.

(oldo) abniti

Ĝis nun la societo Espero ricevis monoferojn por aranĝi paviljonon en l' ekspozicio de sekvantaj personoj: Rodionov 1 rub. Dombrovski pastro — 5 rub. Moŝumanskaja — 50 kop. Kijanovski — 50 kop. Demĉenko — 50 kop. Sazanov — 1 rub. kaj Pavlovski — 20 rub. 10 kop.; kune = 28 rub. 60 kop.

La sekvantaj monoferoj estos presitaj en "L. I."

V. Rogaĉev-Antonov,
membro de la Komitato de Espero.

* * *

S-ro A. F. Postnikov, inĝeniero milita, intencas fari vojaĝon en Eŭropo kaj forveturos el Peterburgo je 10/22 Novembro al Parizo. Li vizitos ĉiujn esperantistojn en la urboj, kie li preterveturos.

* * *

Propagandaj kovertoj en sveda lingvo estas preparataj de s-ro Laurén. En Finnlando estas uzataj speco da patentitaj kovertoj, konstruitaj speciale por malfaciligi intervojan malfermon. Tiuj ĉi estas tre oportunaj kiel propagandaj kovertoj, ĉar ilia posta flanko estas unupeco. S-ro L. traktis pri mendo kun la posedanto de la patento, kaj baldaŭ la kovertoj estos aĉeteblaj ĉe s-ro L. en Kannus kaj ĉe la Klubo Upsala kaj sendube ankaŭ ĉe la Klubo Stokholma. Ili koston 1 kr. po 100. — Ĉu ni bezonas diri, ke s-ro L. tute ne atendas ian monan profiton el tiu ĉi afero?

Se la esperantistoj kutime uzos la propagandajn kovertojn, ili sendube povos tiamaniere disjeti multajn semojn por la sukceso de nia lingvo en la skandinavaj landoj.

—>:⊕:◀—

Steloj falantaj.

Tra senlimaj arbaroj de montego iras en klara nokto dektri sorĉuloj. Ili apartenas al gento de l' grandeguloj kaj la plej altekreskaj pinoj apenaŭ tuŝetas iliajn mentonojn. Ili portas pafarkojn kaj sagojn kaj ili babiladas kaj ridadas, dum ili kun grandaj paŝoj supreniras la krutajon. Estas ridoj bruegantaj, kiuj resonadas inter la montoj kaj malsupren ruladas en la valojn simile je surda ventego.

Alvenintaj sur la plej altan pinton de la montego ili ekhaltas kaj rigardas ĉirkaŭen. Profunde sub ili kuŝadas la tero kaj ĉirkaŭ ili leviĝas la ĉielarkajo klara kaj per steloj surŝutita.


“Brila vetero de pafado hodiaŭ vespere“, tiam diras unu el la grandeguloj metante sagon sur la kordon de l' pafarko.

“Brila, brila“, — ĉiuj la aliaj murmuris kaj ekridas.

Tiu, kiu unue parolis nun celas supren, rekte al la ĉielo, kaj ekpafas.

Siblante la sago elflugas kaj malaperas. Kun okuloj kaj buŝoj malfermitaj, ĉiuj silente atendadas kaj subite stelo disiĝas de l' blua arkaĵo, suben ekfalas kaj estingiĝas en la nokto.

El sveda lingvo tradukis H. C—d.



La trompita demono.

(Hinda fablo.)

En urbo Vatsoma vivis iam unu lerta bramano. Li havis malican edzinon, de kiu ĉiuj estantoj tremis; jes ankaŭ la spirito, kiu en unu antaŭ la domo staranta arbo loĝis, ne povis jam elteni, sed li rifuĝis en arbaron. Post malmulte da tempo, rifuĝis mem la malriĉa bramano el sia domo. Okaze kondukis lia vojo tra tiu sama arbaro en kiun la spirito rifuĝis.

Unu vesperon li kuŝis sub arbo lace de vojo, kiam subite aperis al li la terura formo de l' spirito.

“Bonveno al vi en mia loĝo!“ diris la terurulo al la tremanta bramano.

“Vi estas laca de via irado kaj serĉas ripozon en mia hejmo: mi volas doni al vi gastdonacon, kiel tio decas!“

La bramano pensis: “Nu, nun venis mia lasta horo“, kaj diris per mallaŭta voĉo:

“Jes, mi jam konas vian donacon: faru vi mallonge ĝin!“

Sed la spirito diris: “Ne timu! Mi longe da tempo ĝuis vian gastamon, dum via malica edzino ne forpelis min; nun tie ĉi estas la tempo por egaligi mian ŝuldon. Aŭskultu! Iru morgaŭ en Mrgâvatin en la palacon de l' reĝo Madano. Tiu regnestro havas belan filinon, nome Mrgalotŝana: en ŝi volas mi loĝi. Tiam venos multaj magiistoj por kuraci la malsanulinon; sed mi ne eliros el ŝi, nur tiam se vi volos. Tuj kiam vi montros vin, mi forlasos la filinon. Sed ion diras mi al vi: Mi ne permesas al vi duafoje provi el iu spiriton elpeli, ĉar mi venĝos al mi.“

Post tiuj ĉi vortoj malaperis la demono kaj iris en la filinon de l' reĝo Madano. La reĝo estis tre malĝoja pri la malsaneco de sia filino. La plej konataj magiistoj provis liberigi la reĝidinon de la demono, sed — vana estis ilia scienco.

Tiam la reĝo anoncis, ke li donos la manon de sia filino al tiu, kiu povos kuraci ŝin. Ĝus venis la bramano en la palacon. Li trankvile enpaŝis kaj diris: "Kion promesas homoj el nobla gento, tion ili ankaŭ tenas. Vi ankaŭ ne rompos vian promeson, vi estas ja el dia gento."

Tuj forlasis la turmentanta demono la reĝidinon; kaj la bramano fariĝis regnestro, kaj la reĝo donacis al li la duonon de sia lando.

Tra multaj jaroj vivis la bramano kun sia edzino feliĉe, kontente.

Tiam okazis, ke Sulotŝana, la reĝino de Karnavati, — kies frato estis Madano — malsaniĝis: unu demono elektis ŝin je sia loĝo, kaj volis ne forlasi ŝin malgraŭ la petoj de magiistoj. Kiam ŝi sentis proksimi sian finon, ŝi vokis la bramanon por helpo. Komence li volis ne rompi sian, al la demono donitan, promeson, sed poste cedante al la petoj de sia edzino li vojaĝis Karnavatin.

Kiam li paŝis al la malsanulino, la demono venis en granda kolerego kaj diris: "Ve al vi! Vi rompis vian donitan vorton! Tiel ĉi dankas vi mian bonecon! Sed nun tremu!"

Tiam ĉi la bramano rimarkis, kun kiu havas li aferon. Rapide decidante, li paŝis al la reĝino kaj diris al la spirito: "Mia sinjoro, tio kondukis min tien ĉi, ke mia malica edzino venas kaj tuj estos tie ĉi; volu ne koleri, mi venis nur diri."

Apenaŭ aŭdis la demono tiujn vortojn, kiam li en plej granda teruro forrifuĝis, kaj la reĝino estis kuracita el sia doloro.

Por la "L. I." tradukis: **L. de Makay.**



Saludador.

Hispana fabelo.

— Al s-ino *Vivjeja Stefanovna Osetrova* dediĉas la tradukinto. —

(Daŭrigo).

Elaŭskultinte tion, kion oni parolis al li, Betiri diris, ke li tuj plenumos la ordonon de la reĝo, li tuj sidigis sur ĉevalon, kiun oni alkondukis al li kaj prepariĝis por veturi. Tiam la patro ĵetiĝis ĉirkaŭprenadi Betiri'n kaj kun larmoj kredigadis, ke li ne povas kun li disiĝi. Tiam oni donas ankaŭ al li ĉevalon, kaj li veturis kune kun la filo. La rajdantaro tuj sin movis. Betiri veturis en la mezo de l' rajdantaro, kiel kaptito. Li afable balancetis per la kapo al siaj kunlandanoj kaj ridetis al ili, kvankam li mem apenaŭ tenis la larmojn de malĝojo, forlasante sian naskolandon.

Ili veturis 12 tagojn kaj fine alveturis en la urbon, kie loĝis la reĝ-edzino. Al ŝi estis tre malbone. Ĉiuj stratoj estis sternitaj per pajlo, por ke bruo ne estu aŭdata. En la urbo estis morta trankvileco; ĉiuj timis maltrankviligi la malsanulinon.

Sed Betiri'n ne tuj oni kondukis al la reĝedzino. Antaŭ ĉio al li kun la patro oni donis dometon apud la palaco por loĝi, vestis lin en riĉajn vestojn kaj nutris per bonega tagmanĝo. Nur post la tagmanĝo alvenis al Betiri maljuna kortegano kaj komencis lin instrui, kiel li devas teni sin antaŭ la reĝino, kiel li devas saluti, kiel li devas genuiĝi, kion li devas paroli k. t. p. Fine li diris ke Betiri ne devas altuŝi per sia mano la reĝedzinon, ĉar li estas simpla homo, kaj laŭ antikvaj kortegaj moroj hispanan reĝedzinon povas altuŝi nur eminenta nobelo. Betiri aŭskultis komence silente, sed tie ĉi li

diris, ke li devas nepre tuŝi la frunton aŭ la koron de la reĝedzino, aŭ ŝian manon, konforme al tio, kio doloras ĉe ŝi, kaj ke alie li ankaŭ ne povas ŝin kuraci. La kortegano en teruro levis siajn manojn super la kapo kaj diris:

— Altuŝi hispanan reĝedzinojn al simpla homo ne permesas la leĝo! Tio ĉi estas krimo, kiu estas punata per morto!

Sed Betiri persistis kaj malgraŭ ĉiuj admonoj de la kortegano li diris tamen, ke li devas altuŝi la reĝedzinojn por sanigi ŝin.

— Tio ĉi estas neebla! Tio ĉi ne estas vidita kaj aŭdita! parolis la kortegano. — Mi ne volas vivi ĝis tiu tago, kiam oni kuraĝos altuŝi la reĝedzinojn de Hispanujo!

Kaj li en kolero foriris de Betiri kaj rakontis al ĉiuj korteganoj pri lia obstineco.

La kortegajn morojn en la palaco oni gardis severe kaj tial ĉiuj tumultigis, kiam ili eksciis, kiamaniere kuracas Saludador. Oni kunvokis apartan konsilon por decidi, kion oni devas fari en tia okazo. Unuj parolis, ke oni devas forgesi antikvajn morojn por savi la reĝedzinojn, aliaj parolis, ke antikvaj moroj estas pli gravaj ol ĉio kaj ke estos pli bone, se mortos la reĝedzino, ol defekti antikvajn morojn.

Dume la tempo pasis. Kun ĉiu tago fariĝadis al la reĝedzino ĉiam pli kaj pli malbone. Saludador sidis en sia ĉambro kaj malĝojigis pro tio, ke per nenio li povas helpi al la malsanulino.

— Se mi povus nur ekvidi ŝin! pensis li. — Mi ne aŭskultus tiujn ĉi korteganojn, kvankam poste mi devus morti...

Li multe pensis pri tio ĉi. Unu fojon li rigardis la reĝan palacon kaj ekrimarkis, ke unu el la ŝtuparoj estis kovrita per plej grandaj kaj dikaj tapiŝoj.

Tiu ĉi ŝtuparo kredeble iras en la ĉambron de la malsanulino, ekpensis Betiri, — tiuj ĉi tapiŝoj estas sternitaj por tio, ke ne estu aŭdata bruoj. Se mi leviĝos laŭ tiu ĉi ŝtuparo, tiel eble mi venos ankaŭ ĝis la ĉambro de la reĝedzino...

En tiu sama vespero li formetis siajn ŝuojn por pli mallaŭte paŝi kaj en la mallumo venis ĝis la ŝtuparo, poste li komencis mallaŭte kaj singardeme sin levi laŭ ĝi. En la palaco estis multe da servistoj kaj gardantoj, sed ĉiuj ili forlasis sian aferon kaj babilis inter si. Estis videble, ke ĉiuj pensis, ke la reĝedzino baldaŭ mortos, kaj ne penis servi al ŝi. Betiri nerimarkite trairadis laŭ la molaj tapiŝoj preter la malatentemaj servistoj kaj gardantoj. Fine li venis ĝis granda kurteno el ruĝa veluro; li fortiris la kurtenon — kaj subite li aperigis en la dormoĉambro de la reĝedzino. La reĝedzino kuŝis sur lito kun fermitaj okuloj, apude brulis kandelo kaj lumigadis la belan, sed malgrasiĝintan kaj palan vizaĝon de la reĝedzino. Ĉe la lito sidis kaj dormetis en apogseĝo maljuna sinjorino. Betiri alŝteligis sur piedfingroj al la malsanulino. Ŝi tuj do malfermis la okulojn, ekrigardis lin kun rideto kaj diris:

— Vi estas Saludador, mi scias tion ĉi... Savu min!

Betiri klinis sin super ŝi kaj petis rakonti, kian doloron ŝi havas. La reĝedzino tuj do komencis paroli, ke ŝi havas doloron en la kapo, kaj en la brusto, kaj en la koro, kaj ankoraŭ multe da aliaj doloroj. Tiam Betiri almetis unu manon al ŝia frunto kaj duan al la koro — kaj ekĝemis de bedaŭro.

— Vi ĝemas tial, ke oni ne povas al mi helpi? demandis lin la reĝedzino.

— Ne. Sed mi povas de unua fojo elkuraci nur unu doloron kaj tial vi devos longan tempon kuraciĝi, respondis Betiri.

— Tio ĉi nenion signifas! diras la reĝedzino, — al mi estas jam nun pli facile per via benita mano.

Tiam Betiri fermis la okulojn kaj ekvidis diversajn herbojn sur verdaj herbejoj, en profundaj valoj, sur malnovaj ruiniĝintaj muroj; li vidis blankan muskon sur grandegaj ŝtonoj, vidis mirindan ŝtonon de verda koloro, kaŝitan en profundeco de montoj; li vidis fiŝon kun kuraciga galo: la fiŝo naĝadis en maro, malproksime de homaj okuloj... Sed subite la maljuna virino, kiu sidis ĉe la lito de la malsanulino vekigis, ekrigardis Betiri'n kaj ekkriis per furioza voĉo.

— Pro la nomo de Dio silentu! diris al ŝi Betiri kaj komencis rapide rakonti al la reĝedzino pri tiuj kuraciloj, kiujn ŝi devas alpreni por saniĝi. Sed apenaŭ li havis tempon por rakonti al ŝi, per kio ŝi devas kuraci sin de la kapdoloro, kiam oni ekaŭdis laŭtan bruon, — kaj en la ĉambiron kunvenis servistoj, soldatoj kaj korteganoj. Betiri'n oni kaptis ĉe la manoj kaj fortrenis de la reĝedzina lito. Ĉiuj kriis je li kaj minacis. Pli ol ĉiuj kriis la maljuna kortegano.

— En malliberejon lin! kriis li. — Pendigu lin! Bruligu! Li havis la kuraĝon tuŝi per sia mano la hispanan reĝedzinon!

Kaj jen Betiri'n oni enmetis en malliberejon kaj alforĝis per ĉeno.

Dume la kuracilo, kiun Betiri havis tempon montri al la reĝedzino, elkuracis ŝin de la kapdoloro. Tiam ĉiuj ekvidis, ke nur Betiri povas elkuraci la reĝedzinon, sed kiamaniere oni povas preteriri antikvan moron? Longe pensis la reĝo kaj korteganoj — fine ili decidis. Oni prenis Betiri'n el la malliberejo, forkondukis lin en la dometon, kie li loĝis, vestis lin tie en veluron kaj oron, ĉirkaŭzonis lin per multekosta glavo, metis sur lia kolo oran ĉenon kaj sur lia kapo larĝan ĉapelon kun granda blanka plumo, poste aperis tuta amaso da ornamitaj korteganoj kaj kondukis Betiri'n en la reĝan palacon. Li eniris en grandan ĉambiron, kie sidis la reĝo mem, ĉirkaŭita de grandsinjoroj. Tie ĉi oni anoncis al Betiri, ke lin oni faras eminenta nobelo kaj ke de tiu ĉi tempo li povas altuŝi per sia mano la reĝedzinon. Al Betiri estis malfacile kaj maloportune en la riĉa ornamo, sed li pensis, ke ĉion oni devas elporti por savi la reĝedzinon.

Post tio ĉi Betiri povis alveni al la reĝedzino, kiam li volis, kaj elkuracadis ĉe ŝi unu doloron post alia. La kuracado iris malrapide, ĉar ŝi havis multajn dolorojn, sed fine venis tago, kiam la reĝedzino tute saniĝis. En tiu ĉi tago al Betiri venis amaso da korteganoj kaj alportis al li riĉegajn trezorojn, kiujn donacis al Betiri la reĝo por danki Betiri'n por la savo de la reĝedzino. Maljuna Sanc, la patro de Betiri, saltis pro ĝojo; sed Betiri anoncis, ke li povas preni nenian donacon. La korteganoj ekmiris kaj diris al li, ke de reĝa donaco oni ne povas rifuziĝi, sed Betiri parolis sian. Tiam komencis lin insulti la patro, la bedaŭrinda Betiri ekploris de malĝojo, sed tamen restis ĉe sia opinio. Tiam la maljuna Sanc elpensis ruzajon. Li prenis sub brakojn la plej eminentan el alvenintaj grandsinjoroj kaj diris al li, ke Saludador'oj neniam prenas pagon de unua fojo kaj ke oni devas devigadi ilin preni perforte.


— Tian jam moron ili havas, parolis la ruza maljunulo. Provu lin devigi. Oni devas nur meti lin por kelkaj tagoj en malliberejon, kaj li konsentos.

La kortegano ekkredis al la maljunulo, kaj jen la bedaŭrindan Betiri'n oni ree enmetis en malliberejon. Dum li turmentigis tie, patro lia kolektis ĉiujn riĉaĵojn, kiujn oni donis al lia filo kaj forveturigis ĉion tion ĉi en sian vilaĝon. Post kelka tempo Betiri'n oni liberigis. Tiam li formetis de si la multekostan veston, vestis sin en sian antaŭan, en kiu li venis en la urbon, prenis sian bastonon kaj eliris el la palaco. Neniu lin rimarkis. Betiri eliris el la urbo piedire, sed kun trankvila koro, kaj iris laŭ la vojo, kiu kondukis en lian naskolandon, kie staris la malriĉa dometo sub la alta kverko.

Tie, en tiu ĉi dometo, li travivis la tutan ceteran vivon. Lia patro kaj fratoj fariĝis riĉaj per la reĝaj donacoj kaj ne volis aferi kun la malriĉulo Betiri. Multaj daŭrigadis ridi je li kaj nomis lin malsaĝulo pro tio, ke li ne akiradis al si riĉecon, sed malsanuloj, kiel antaŭe, iradis al li kaj li, kiel antaŭe, kuracis ilin... Kiam do Betiri mortis, tiam ĉiuj subite komencis bedaŭri kaj glorigi lin...

Tiel ofte okazas, ke ni ne scias ŝati bonajn homojn dum ilia vivo kaj komencas plori kaj malĝojiĝi post ilia morto!...

El rusa lingvo tradukis **Aleksandro I. Semjonov.**



Epigramo.

Al Di' popoloj du preĝadojn donas,
Ke ĉiu venku malamikon sian, —
Du fratoj, kiuj al la patr' admōnas
Al unu helpi tranĉi la alian.

Sigurd Agrell.

ANONCOJ.

N. O. Lindbäck,

juvelisto en **Luleå** (Svedujo),

rekomendas sekvantajn laplandajn ornamojn:

Zono el ledo kaj drapo por viroj kun 18 grandaj arĝentaj surornamoj, prezo: de 40 ĝis 130 kronoj.

Zono el ledo kaj drapo kun 20 arĝentaj surornamoj, prezo: 20 ĝis 100 kr.

Kulero el arĝento, " 8—16 "

Pipo el arĝento, " 10—16 "

Broŝo el arĝento, " 3—20 "

Horloĝa ĉeno el arĝento por viroj, prezo: 8 kr.

Tia sama por virinoj, " 6 "

Ringo el arĝento por virinoj, " 3 "

" " oro, prezo 15—20 "

Monon oni povos sendi plejbone en franca, germana, sveda kaj angla papera mono aŭ per poŝta mandato.

Ĉiujn artikolojn mi sendas en rekomendata letero.

N. O. Lindbäck.

Adreso: **Luleå** (Svedujo).

Ĉe la **Klubo Esperantista en Upsala** estas aĉeteblaj:

La literaturisto kaj lia fianĉino. Rakonto de Emelie Flygare-Carlén. Tradukis **Otto W. Zeidlitz.** Kostas 65 centimojn.

Du Mirrakontoj de **Otto W. Zeidlitz.** Kostas 40 centimojn.

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la **Societo "Espero" en S. Peterburgo.** Kostas 1 frankon.

Ankaŭ alian literaturon esperantan oni povas akiri ĉe la Klubo Esper. Upsala, kiel ankaŭ ĉe D-ro Zamenhof.

La kumiso-eksport'

neniam difektiĝas. Oni povas ĝin ricevadi dum la tuta jaro. Broŝuro (en rusa lingvo) oni ricevas senpage. Adreso: St. **Smyšljaevka** Samaro-Zlatoust. ĵel. dor. Al s-ro **B. Postnikov.**